Esperantologio / Esperanto Studies **1** (1999), 7–13

Paul Neergaard, 1907–1987

Marjorie Boulton

Oni petis min plekti girlandon, por honori la memoron de Paul Neergaard, ĉef-redaktoro de *Esperantologio* de 1946 ĝis 1961; kaj mi trovas la taskon tre malfacila, ĉar scioj kaj memoroj preskaŭ sufokas min, kvazaŭ en ĉambro plena de diversodoraj materialoj: necesas rozoj, lilioj, diantoj, lotusoj, narcisoj, gencianoj, erikoj, hibiskoj, asfodeloj, konvaloj, lekantoj, violoj, floroj el multaj landoj; kaj, ĉar tre interesis lin folkloraj nomoj de floroj, ankaŭ kristorozo, ĉevalpiedo, kavalirsprono, leonfaŭko, paŝtista burso, ora vergo, sunfloro kaj, kompreneble, neforgesumin' – kvankam la lasta estas admono superflua. Kaj ĉar li faris unikan, vastan laboron por plibonigi grenrikoltojn tra la mondo kaj tiel batali kontraŭ malsato, devus enesti kelkaj spikoj de tritiko kaj hordeo, panikloj de aveno, rizo, milio, sorgo, eĉ spadiko de maizo. Devus enesti verdaĵoj, almenaŭ folioj de laŭro por lia renomo, sed ĉu ne ankaŭ kelkaj folioj de plantoj, kiujn liaj laboroj plibonigis? – de laktuko, brasiko, betoj, kelkaj guŝoj de sanaj pizoj, faboj, fazeoloj, kelkaj sanaj fruktoj, kaj nepre devus esti verda rubando kun verda stelo ie. Kiel plekti, kiel porti? La imago fariĝas groteska; sed tiu superabundo, tiu sufokiĝo de girlandisto, bone simbolas la esencan neeblecon, adekvate prezenti talentojn tiel multflankajn, atingojn tiel diversajn, personecon tiel riĉan kaj kompleksan.

Iam, kun lia dana-angla vortaro sub alia mano, mi iom esploris en konsultlibro la genealogion de Pierre Paul Ferdinand Mourier de Neergaard (Nyborg 1907 02 19 – Kopenhago 1987 11 13), kiu fakte estis minora nobelo dana, kvankam pli nobla ol nobeleca – kaj ano de Sennacieca Asocio Tutmonda dum pli ol kvindek jaroj. Li devenis de interesa dana familio, generacioj de diversaj talentuloj kaj respondeculoj; lia patro, severa homo, estis armea oficiro; multaj scias ke lia filo Jesper Neergaard estas skulptisto, kiu kreis *La Espero* nun starantan en Graz; unu frato estis filmreĝisoro. Lia familia nomo Mourier devenis de iom aristokrata francino, kiu kiel hugenoto rifuĝis en Danlandon dum persekuta epoko; kaj eble kelkaj importitaj genoj de virino, kiu sin ekzilis pro konscienc-libereco kaj rekonstruis vivon en tiel fremda medio kiel edzino de dano, iomete kontribuis al la karaktero de nia Paul Neergaard: internaciisma, ege sendependa pense kaj vivostile, adaptiĝema, liberama...

Ekzistas, en lia kampara domo Stendal, granda familia pentraĵo; en tiu grupo Paul, blonda knabo eble dekjara, staras, ne sidas kiel la aliaj; li insistis, ke li staru, "ĉar iam mi estos renoma". Alihumore, li konservis ĝismorte, intencante citi ĝin en la aŭtobiografio, kiun, tre bedaŭrinde, li nur komencis verki, ĝenerale ne tre laŭdan lernejan raporton, kies plej ĉarma misprofetaĵo estas averto pri lia maldiligento kaj manko de talento pri – botaniko.

Lia kariero, kiu kulminis je multjara profesoreco kaj tutmonda renomo en sia fako, ne sekvis rutinan vojon; li komencis, propravole, kiel simpla ĝardenisto. Li iam rakontis al mi tre komike, kiel vizitantoj al la ĝardeno videble estis en embaraso: ĉu kutima trinkmono ofendus tiun junulon, edukitan al modela elparolo kaj polurita ĝentileco? Sed en 1929 li fariĝis studento en la Reĝa Veterinara kaj Agrikultura Kolegio, Kopenhago, kaj en 1932, la unua dana bakalaŭro pri agrikulturo. Ekde tiam, li laboris pli per mikroskopoj kaj provtuboj ol per ŝpato kaj hojo. Li atingis licencion en 1935.

Li doktoriĝis en agronomio, per vasta studaĵo pri du parazitaj fungoj, kiu aperis libroforme, en angla traduko, en 1945. La dato signifas, ke Neergaard persistis ĝisfine dum la mizeraj jaroj de la nazigermana okupacio de Danlando, meze de mankoj, tiranaĵoj kaj danĝeroj. Dum tiu okupacio li diversmaniere helpadis la danan rezistmovadon, ekzemple per morton-riskanta sekreta gastigado. Kiam iu demandis lin, kiel li, kun infanetoj kaj esperoj pri brila sciencista kariero, akceptas tiajn taskojn, li respondis – kaj mi ja povas imagi la fiksrigardon de tiuj miopaj, sinceraj bluaj okuloj kaj lian mildan, maldramigan tonon: "Sed kiel alie mi povus agi?"

Dua signifa trajto de tiu grava faklibro pri *Alternaria and Stemphylium* estas, ke ĝi enhavas ne nur danlingvan resumon, sed resumon en Esperanto (pp. 431–437). Por Paul Neergaard Esperanto estis ne agrabla eta hobio, sed lia dua fako, kaj ankaŭ kiel esperantisto li akiris tutmondan renomon inter seriozaj samfakuloj.

Li esperantiĝis en 1924, do kiam li estis nur 17-jara; li tiel entuziasmiĝis, ke kun unu kamarado li biciklis de Kopenhago al la 17-a Universala Kongreso en Ĝenevo, 1925. Okdekjara, li daŭre laboris por Esperanto ĝis preskaŭ siaj lastaj horoj. Jam kiel junulo li plene konvinkiĝis pri la graveco de Esperanto por scienca progreso, klerigado kaj kunlaborado; kaj en lia lasta faka libro, *Seed – a Horse of Hunger or a Source of Life?* 'Semo – ĉu ĉevalo de malsato aŭ fonto de vivo?' (Kopenhago 1986), la lasta ĉapitro, pri "Lingvaj bariloj kaj korodado de komunikado pri scienco" (pp. 114–140) detale pritraktas, kun malkvietigaj statistikoj, la lingvajn barilojn kaj diskriminaciilojn inter sciencistoj; inter aliaj ekzemploj, Neergaard priskribas siajn personajn spertojn, kiel instruisto pri sempatologio al studentoj el multaj subevoluintaj landoj; en la lastaj tri paĝoj li lerte kaj takte prezentas Esperanton kiel neŭtralan, facilan kaj, precipe, egaligan.

Simile, tra lia tuta vivo, la tri fadenoj de scienca esplorado, scienca klerigado kaj Esperanto ne nur daŭris paralele, sed interplektiĝis. Mi nun penos sekvi tiujn fadenojn aparte; sed ni memoru, ke inter la intelektaj laboroj de Paul Neergaard ekzistis eksterordinara harmonio kaj konsekvenceco, kun granda sindediĉo.

Paul Neergaard fariĝis plantpatologo kaj mem faris multajn esplorojn, pri kiuj li verkis multajn specialistajn studaĵojn; li verkis pri ĉirkaŭ cent plantaj malsanoj aŭ patogenoj ne antaŭe konataj, aŭ nekonataj en Danlando, kaj pruvis, ke kelkaj centoj da plantmalsanoj infektas per semoj. Ekde 1934 li interesiĝis precipe pri sempatologio, kaj ne estus troigo nomi lin la ĉefa patro de tiu scienca fako: li elpensis multajn test-metodojn, statistikajn metodojn kaj rimedojn kontraŭ sem-infektoj. Lia vasta, inkluziva duvoluma *Seed Pathology* (Londono, reviziita eldono 1979) restas la ĉefa konsultlibro pri tiu temo. Li verkis ĝin en la angla, en stilo neordinare klara; ĉar Neergaard, kiu tre deziris, ke Esperanto helpu ĉiujn, mem brile regis la anglan kaj utile scipovis la francan, germanan, italan, norvegan kaj svedan. Li iam diris al mi, ke la lingvoj, kiujn li plej amas, estas, unue la dana, due Esperanto, trie la angla – kiu devis esti la laborlingvo de lia instituto kaj de multaj sciencaj konferencoj, kiujn li ofte prezidis; sed li ankaŭ tre konsciis pri la maljustecoj kaj malhelpoj kiujn kaŭzas la trudado de la malfacila, kaj prononce tre ĝene varia, angla lingvo por tiaj aferoj.

(Dum neforgesebla festego por sia 80-a naskiĝdatreveno, li parolis sprite kaj elegante, por la diversaj gastoj, dane, angle kaj esperante!)

Dum multaj ŝtatestroj promesadis, fanfaronadis pri neatingitaj atingoj kaj diversmaniere disblovadis retorikajn gasojn, Paul Neergaard faris por multaj popoloj, precipe en subevoluintaj landoj, pli ol la plimulto de iliaj politikistoj, kun malmulta bruado. Liaj esploroj pri sempatologio grave kontribuis al pli sanaj plantoj kaj pli abundaj rikoltoj en multaj landoj. Paralele kaj egale valoraj estis liaj laboroj instruaj. Unue li laboris en internacia komitato pri plant-malsanoj kaj en la plantprotekta servo dana; ankaŭ profesoris dum jaro en Libano; sed en 1966 li fariĝis fonda estro de la Dana Ŝtata Instituto pri Sempatologio por Evolulandoj, kaj restis estro ĝis 1982, emeritiĝante nur kiam li estis 75-jara, kaj eĉ poste iom laborante en la instituto kiel konsilanto. Tie li edukis pri sempatologio multajn studentojn el Azio, Afriko, Sudameriko – entute el 58 landoj. Iom post lia emeritiĝo mi vizitis lian instituton. Tre impresis min la sciencaj aparatoj, la subtilaj eksperimentoj, kaj la multaj naciecoj de tiamaj kaj eksaj studentoj; sed plej impresis min la momento, kiam profesoro Neergaard eniris ĉambron – kaj subite ĉiuj studentaj vizaĝoj ekradiis pro ĝojo. Evidentiĝis tuj, kiel la studentoj ne nur estimas, sed amas lin. El tiu instituto iris ĉiujare diplomitoj, ame sed strikte trejnitaj, kiuj en propraj landoj progresigis sempatologiajn studojn, gravajn kontrolojn kaj purigajn laborojn, por ke la landaj kultivaĵoj fariĝu pli sanaj kaj riĉrikoltaj.

En la instituto profesoro Neergaard kutimis ŝerci pri sia ne tre konvencia privilegio: "Mi ĉiam frapas la postaĵojn de la viroj kaj kisas la virinojn". Sed estis karakterize de li, ke li neniam praktikis sian neortodoksan riton ĉe la hindaj studentinoj, edukitaj pli pudore ol la aliaj; li deziris krei etoson de amikeca bonhumoro, ne ofendi ies delikatecon. Kiel Julio Baghy, li estis tre karesema, sen iu ajn sugesto de sintrudo aŭ mislokita lascivo.

Li vizitis multajn landojn por instrui pri sempatologio aŭ gvidi sciencajn konferencojn: Argentinon, Brazilon, Brition, Ĉinion, Egiption, Etiopion, Filipinojn, Ganaon, Hindion, Italion, Kanadon, Kenjon, Libanon, Lesoton, Madagaskaron, Malajzion, Malavion, Malion, Marokon, Pakistanon, Pollandon, Tanzanion, Turkion, Usonon, Zambion, laŭ dokumentoj sub mia mano; mi preskaŭ certas, ke ĉi tiu listo estas nekompleta. En tre diversaj medioj kaj kulturoj li igis sin respektata kaj amata. Sciencaj akademioj, registaroj kaj universitatoj diversmaniere honoris lin. Li daŭrigis tiujn ofte tre lacigajn vojaĝojn kaj laborojn ofte en neidealaj kondiĉoj, en alta aĝo kaj duba sanstato. (Estis nur en sia 81-a jaro, ke li nuligis planon iri al Indonezio laŭ invito, ĉar li finfine decidis, ke li ne sentas sin sufiĉe bonfarta!)

Superŝutita per honoroj, konscia, ke liaj sciencaj laboroj modifos la homan sorton en multaj landoj, profesoro Neergaard, kiu alte taksis memironion kiel psikan sanigilon, neniam perdis humursenton. Ekzemple, dum serioza prelego, kun lumbildoj, pri sia laboro en la Tria Mondo, li subite montris bildon, el Hindio, en kiu bovino sidis tre proksime al la studenta grupo, kiun li, kiel buklakapa dana budho, instruis sub granda arbo. Post la prelego iu demandis: "Ĉu vi ne timis tiun grandan bovinon?" Komike seriozmiene, li respondis, "Tute ne! Ĉu vi ne rimarkis, kiel ŝi atentis? Ŝi volis lerni ion pri sempatologio."

Kutime mildmaniera kaj afabla, li kapablis koleri; foje li skoldis funkciulojn, eĉ ministrojn, kiuj ne aranĝis kontroladon de semoj enirantaj iliajn landojn; li rapide koleris, foje iom senproporcie, se li devis vicatendi, sed li insistis, ke vicatendado ofte signifas ian malatenton al homaj bezonoj – nesufiĉan stabon, nekompetentan organizadon, mankon de antaŭpensado, k.t.p. Sed mi vidis lin plej indigna, pri certaj burokratoj, kiuj (preskaŭ nekredeble, sed fakte) intence lasis surtable, ĉar atendigado kvazaŭ gravigos iliajn oficojn, leterojn avertantajn pri malsategoj en iuj distriktoj, tiel ke oni ne sendis urĝan helpon. Neergaard prave diris, ke tia vantemo estas murdo.

La internacieco de liaj sciencaj kaj edukaj laboroj konstante konfirmis ĉe li la gravecon de lingvaj malhelpoj, kaj lia esperantismo estis fervora, altnivela kaj scienceca.

Al nia leksikologio li kontribuis valore, per *Fremdvortoj en Esperanto* (Parizo 1933), *Terminaro Hortikultura Seslingva* (Parizo 1938), *Internacia Fungo-Terminaro* (nur en *Esperanto Tidende*, Kopenhago 1943); grava artikolo, kiun li mem konsideris kiel testamentan definitivan verkon, "Plantnomoj en la Lingvo Internacia", en *Serta Gratulatoria in Honorem Juan Régulo*, vol. II (La Laguna 1987), sed precipe per vasta kunlaboro pri botaniko, agrikulturo, hortikulturo kaj fitopatologio, en *Plena Ilustrita Vortaro* (Parizo 1970); li restis multjare en amika kolega rilato kun Gaston Waringhien.

Dum la vivo li kolektis esperantajn librojn kaj gazetojn, kaj dediĉis averaĝe kelkajn horojn semajne al tre preciza klasifikado kaj ordigado de sia grava privata esperanta biblioteko, uzante la internacian decimalan klasifikon. Tro granda por lia apartamento en Kopenhago, tiu bibliotekto okupis ĉirkaŭ 60 metrojn da bretoj en Stendal. Li volonte allasis seriozajn esploristojn; mi mem iam pasigis valorajn horojn studante tie; kaj li povis tuj meti la manon sur iun ajn libron aŭ dokumenton bezonatan – sub la okuloj de la multaj nigraj statuetoj, memoraĵoj pri liaj vojaĝoj en Afriko. Li antaŭplanis la destinon de sia kolekto detale, kaj testamentis ĝin al la Dana Reĝa Biblioteko en Kopenhago.

Liaj esperantaj verkoj grave atestas pri la plena taŭgeco de Esperanto por la scienco, precipe *Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj* (Rickmansworth 1954), 234-paĝa detala konsultlibro praktika. Kontraste, lia *Vivo de la Plantoj* (La Laguna 1957), kiu sekvis lian danlingvan libron pri la sama temo, estas ne nur tre klara scienca eksplikaĵo, sed klasike bela poezieca esperanta prozaĵo. Kiam la naziismo jam nigre ombrumis la estontecon, lia *Scienco kaj Pseŭdoscienco pri Heredo kaj Raso* (Parizo 1937) refutis la rasismajn kaj reakciajn teoriojn per informoj pri genetiko. En tiu libro oni trovas ankaŭ kelkajn el la ideoj de Neergaard pri sociaj kaj seksaj reformoj. Kvankam li ne multe pritraktas la temon publike, almenaŭ ne laŭ mia scio, li tre sentis la danĝeron de obskurantismo pri seksaj aferoj, kaj emfazis honestan informadon, toleremon kaj respondecon; estas interese, ke respektata parencino lia, d-rino Lone de Neergaard, nuntempe laboras pri racia, humana seksedukado en Danlando dum la aidesa epoko. Paul Neergaard ankaŭ koncernis sin pri pli ĝeneralaj temoj de socia justeco kaj egaleco.

Li aperigis lernolibron por komencantoj, *Esperanto for Begyndere* (Kopenhago 1939). La dana rezistmovado dum la okupacio 1940–1945, estas granda historio pri kuraĝo, sinoferoj kaj inĝenieco; kaj la danaj esperantistoj defiis la nazian malamon kontraŭ Esperanto. Ilia gazeto dum tiuj jaroj nun prezentas mirindan arkivon de persisto kaj obstina fidelo. Estis en Kopenhago en 1942, ke Paul Neergaard, kun kvar kolegoj, defie iel aperigis *Tra densa mallumo* – titolo senkompromise indikanta ilian takson pri la okupacio! – volumon de seriozaj esperantaj studaĵoj, inter ili "Esperantologio kaj ties disciplinoj. Taskoj kaj rezultoj" de Neergaard mem. Iltis represis tiun studaĵon en 1979. En 1944, kun lia dumviva amiko Poul Thorsen, Neergaard aperigis *Eta Krestomatio*, legolibron por komencantoj, iom kulture valoran ankaŭ. En tiu ĉi libreto ni trovas kredeble la solajn poemojn de Paul Neergaard: la porinfanajn versojn troveblajn en *Esperanta Antologio*, kaj pli kompleksan poemon, "Majstro de la Tero", gaje ironian, fortan kanzonon, mokantan tiujn, kiuj edukas por banalaj vivoj aŭ militaj mortoj, kaj tiujn, kiuj lasas sin banaliĝi kaj trompiĝi.

Tiun kanzonon, tiel defian en 1944, oni kantis laŭ la muziko de B. Christensen unue dum la SAT-kongreso en Kopenhago, 1939, kie Paul Neergaard estis prezidanto kaj pro kiu li tre laboris. Li estis prezidanto de la 47-a Universala Kongreso en Kopenhago, 1956; se mi ne mismemoras, mi tie renkontis lin por la unua fojo kaj estimis lin, kaj li invitis min, kun diversaj verkistoj, al sia hejmo; sed tiutempe mi ne konjektis, ke iam li estos inter la plej karaj personoj en mia vivo. Liaj laboroj por tiu kongreso estis vastaj, lia takto kaj ĉarmo tre valoraj. Kiel ĝenerale, li estis demokrata, afabla, tute ne singravigema; sed en eventoj, kie taŭgis ia ceremonia digno, profesoro Neergaard ja faris ĝuste kaj bele. Li ĉiam pripensis la prestiĝon de Esperanto en la reala situacio. Escepte de liaj maloftaj kolereksplodoj, li estis homo tre ĝentila – kaj ne nur supraĵe, mondume, sed el la profundo de sia respekto al aliaj homoj. (Mi ofte vidis lin tiel ege ĝentila kaj afabla al, ekzemple, kelneroj, vendistoj, riparistoj kaj simile, ke li kredeble lasis ilin iom pli bonhumoraj pro ia malgrava kontakto.)

Mi sporade korespondis kun li dum mi estis sekretario de la Internacia Somera Universitato. Leterskribado estis por li nefavorata okupo, sed inter tiuj, kiujn mi invitis prelegi, li estis unu el la plej fidindaj pri respondoj kaj aranĝoj: ĉiam ĝentila, ĉiam kapabla. Li prelegis dekfoje en diversaj ISU'oj.

Kiel mi, li estis iom mallerta korpe, kaj profesore distriĝema, pri kio mi havas kelkajn ridetigajn memorojn. Malkiel mi, li tre ĉarme ridetis pri si mem kaj liaj dolĉaj memironioj ofte plaĉis al la ĉeestantoj. Dum unu ISU oni uzis mikrofonon kun speco de malbeninda lazo, kvazaŭ por pendumi la viktimojn; mi memoras, kiel Neergaard kun milde komedia oferbesta humileco klinis sian kapon al la lazo, kaj kompreneble estis el ĉiuj prelegontoj li, kies okulvitroj forfalis. Li tiel ĉarme, antaŭ miloj, akceptis la komikecon de tiu fuŝo!

Li prelegis esperante al multaj aŭskultantaroj, por UEA, por SAT, en San Marino, al multaj diversaj grupoj; same bone kaj serioze al ia grupeto ie, kiel al mondkongreso.

Sed ankaŭ estis li, kiu dum la mondkongreso en Bern, 1947, iniciatis la bibliografian sekcion de la Akademio, al kiu li estis elektita en 1934 kaj de kiu li estis vicprezidanto de 1963 ĝis sia morto. En la Akademio li tre valoris: homo mezvojema, modera, raciema, sobra; homo laborema, helpema, lojala; kapabla modifi sian opinion, se li vidis kredigajn novajn atestaĵojn; kaj pli inklina pacigi ol polemiki kaj troigi. Ŝajnas al mi tre karakterize de Paul Neergaard, ke ĝismorte li restis tre valora, fidela ano de UEA, de kiu li estis en Honora Patrona Komitato; tre valora, fidela ano de SAT; kaj unu el la plej lojalaj kaj komprenemaj amikoj de Ivo Lapenna. Li helpis pri alproksimiĝoj kaj kunlaboroj kaj ĉiam influis bone kaj realisme (ofte postkulise, neoficiale; neniam intrigaĉe aŭ malhoneste).

Gravis ankaŭ liaj laboroj en ISAE, de kiu li estis dum multaj jaroj prezidanto;

en Kopenhago, 1958, aperis la propagande elstare valora *Sciencaj Studoj*, kiun li redaktis kaj al kiu li kontribuis du studaĵojn, aldone al sia konstanta redakta laboro por *Esperantologio*; li verkis multajn artikolojn kaj recenzojn por nia gazetaro – kaj frue kontribuis al *Monato*, kiun li entuziasme bonvenigis, komprenante ĝian gravan signifon. Gravis liaj grandaj, lacigaj, problemplenaj laboroj dum la lastaj jaroj, por helpi la fondadon de la Internacia Akademio de Sciencoj en San Marino, kiu nun estas jam disdoninta siajn unuajn diplomojn; kaj la fondadon de altprestiĝa Akademio Comenius. La aferoj de San Marino postulis de li apartan takton kaj sinoferon; jam malforta kaj suferanta, li plurfoje vojaĝis al San Marino por helpi.

Mi persone konis lian poresperantan laboron plej intime pro liaj pluraj vizitoj al la someraj kursoj, kiujn mi organizis en *Wedgwood Memorial College* en Barlaston, Anglio; kiel tiu granda homo afable kaj kun multa humuro kaj ĉarmo prelegis al malgrandaj grupoj, paciencis kun komencantoj, kuraĝigis timantojn kaj riĉe informis! Arbo plantita je lia memoro nun staras en tiu kolegia ĝardeno. Ĝia angla nomo estas *Scholar Tree* 'Arbo de Erudiciuloj'. En tiuj kursoj li foje montris talenton ne ĝenerale atribuitan al li: li kapablis amatore aktori, en Ŝekspiro, serioze, aŭ en kursfina farso, tre inteligente kaj verve. En la malgranda kolegio li estis tre amata; dum la kursoj en 1988 mi vidis du veteraninojn, kiuj ne konis lin alimedie, subite ekplori por li denove...

Ne estas eble ĉi tie, verŝajne neniam estos eble, priskribi ĉiujn facetojn de lia multflanka personeco; sed mi nepre menciu, ke lia raciismo kaj scienca sobreco ne signifis ian sensangan, fridan temperamenton. Li havis multajn amikojn kaj dum la vivo serioze amis almenaŭ kvar virinojn; sed plej rimarkinda estis lia neordinara amo al siaj infanoj kaj karesemo al infanoj ĝenerale. Li iam menciis al mi, ke li edukis siajn kvar gefilojn, en apartamento sufiĉe malgranda por ses personoj (kaj sur la kvina etaĝo, sen lifto!) kaj neniam frapis eĉ unu el ili. Mi vidis lin inter familianoj kaj miris pri la amoplena atmosfero – similan mi neniam vidis aliloke; mi vidis, kiel li amis la genepojn; kaj en 1987 mi vidis lin kun kelksemajna nova nepineto en la brakoj kaj sunluma ĝojo en la okuloj. Li apenaŭ povis vidi nekonatan infanon sen afabla vorto kaj kareseto. Li simpatiis ankaŭ al bestoj: li konfesis al mi, ke li deziris havi hundon, prefere grandan, lupecan, sed tio ne eblis, pro lia alta apartamento (kiu multrilate tre plaĉis al li) kaj liaj multaj vojaĝoj. Tri katoj miaj (Oliver kaj Bodkin, poste Oliver kaj Aphra) sentis lian amikiĝemon, kaj kutime li devis nur eksidi sur mia sofo por esti preskaŭ kovrita per katoj kaj karesi ilin; li plurfoje diris, ke li amas miajn katojn "ĉar ili estas tiel kontaktemaj".

Li tre interesiĝis pri bonaj manĝoj: saŭcoj gravis, fragoj ravis; sed li manĝis vere modere: havis konsiderindajn konojn pri vinoj, sed drinkis ege modere kaj saĝe; havis seriozan intereson pri pentraĵoj kaj skulptaĵoj, de kiuj li posedis diversajn valorajn; ian intereson pri kino, teatro, literaturo, kaj konstantan seriozan intereson pri politikaj kaj sociaj aferoj. Verŝajne preskaŭ tute sen korpa vantemo, li tamen estis ege purema kaj senteme vestis sin taŭge por diversaj okazoj; en ia formala evento li kapablis aspekti impona, ekscelenceca; por vojaĝoj li mendis specialan kompleton kun abundaj poŝoj, ne ĉiuj videblaj, kaj facile purigeblan; en vere malstreĉaj situacioj li povis aspekti neglekte komforta... kaj liaj kapdorsaj bukloj neniam longe restis ordaj.

Kvankam lia stilo estis plejparte sobra, modera, nedramiga, li kapablis en taŭgaj okazoj fari brile belajn dramajn gestojn, kiuj surprizis kaj efikis. Kvankam li estis homo profunde serioza, lia humuro ĝojigis multajn: kutime lia humuro estis kvieta, milda, iom ironia, kaj tuj donis impreson de amika sinteno: relative malofte, sed en la okazo tute sorĉe, li kapablas ŝercemon farsan, fantazian, junigan; mi ankoraŭ dankas, ĉar mi foje vidis ĝin.

Iam ni piediris kune en ia parko kaj konversaciis; tiutempe li estis jam direktoro de la instituto, kaj mi mem estis direktorino de minora instruista seminario. Subite li turnis sin al mi kaj demandis: "Ĉu, foje, eĉ nun vi sentas, kvazaŭ vi estus ankoraŭ nur unuajara studento, kiu scias preskaŭ nenion?" Kun Paul Neergaard estis malfacile ne diri la veron, kaj mi do respondis, "Jes, ofte." Li, deksep jarojn pli aĝa ol mi kaj nemezureble pli eminenta, serioze jesis: "Ankaŭ mi, ofte." Eble tiu konfeso iom indikas la profundecon de lia saĝo, tamen...

Mi vidis ankaŭ, kiel ofte li kuraĝigis aŭ helpis iun – precipe, kiel kuraĝiga kaj afabla li estis al esperantistaj komencantoj. (Sed eternaj komencantoj iritis lin.)

Iasence, povas resumi liajn meritojn du el la lastaj agoj de lia brila vivo. En 1987 estis finfine videble, ke korpaj difektiĝoj komencas venki la ankoraŭ plene funkciantan spiriton. Laceco kaj konstantaj doloroj foje eĉ ekdifektis lian bonhumoron kaj afablecon. Li estis travivanta, stoike kaj preskaŭ sekrete, kelkajn gravajn operaciojn; la kora funkciado dependis de reguligilo kaj multaj piloloj; dolora difekto en kruro igis piediradon suferiga; flankefikoj de multaj medikamentoj ankaŭ ĝenis lin. Mi foje ŝercis pri "nia kara dormomuso"; sed dum liaj tiutempe malmultaj nedormaj horoj, la intelekto daŭre aktivis kaj brilis. Pro lojaleco, fideleco, pro promesoj faritaj, Paul Neergaard iris en julio al brila konferenco en Graz, la lasta grava evento, kiun organizis Ivo Lapenna – kiu mem estis jam tro malsana por aŭskulti la prelegojn de siaj kolegoj; Neergaard, foje kaŝante sin por dormi en iu anguleto sur lignaj seĝoj, kun mantelo sub la kapo, prelegis kaj diskutis tie ĉiam valore; iris hejmen por multe korespondi pri San Marino kaj la Akademio Comenius. Pro lojaleco, fideleco, pro promesoj faritaj, li en aŭgusto iris al Barlaston, prelegis kaj diskutis ĉiam valore. La 18-an de aŭgusto, li parolis al kunveno de la Oksforda Esperanto-societo; nur sep anoj povis ĉeesti; nun tre videble kaduka, sed ankoraŭ plenumante promeson, tiuvespere li rakontis interese pri danaj kuiraj kaj kristnaskaj tradicioj kaj diversaj lingvaj kaj movadaj aferoj, kaj li kuraĝigis aliajn konversacii. Iomete pli ol tri monatojn poste, li endormiĝis en tiu eta dormoĉambro en Kopenhago, kie li havis ankaŭ sian skribmaŝinon kaj amason da paperoj pri sciencaj kaj esperantistaj laboroj; kaj ne vekiĝis plu.

Jes, mi vidis antaŭe, kun kortuŝo, kiel flamo iam tiel rekta kaj brila ekflagretis, malfortiĝis; sed kiam Paul Neergaard mortis, estingiĝis vere granda, grava fonto de intelekta lumo kaj kora varmo.

Adreso de la aŭtorino: 36 Stockmore Street, Oxford OX4 1JT

Verkita 1988 12; ricevita 1998 09